# TEA-BULTENO

10ᴬ JARO — MAJO - JUNIO 2007 — NUMEROJ 5-6

## Simlish — Ĉu lingvo de l'estonto?

Nuntempe, Interreto fariĝis la ĉefa fonto de informoj, la plej strangaj kaj preskaŭ nekredeblaj.

Kiel tiu artikolo pri la lingvaĵo SIMLISH, publikigita en LA STAMPA kaj legebla – lokigita oni devus diri en ĝisdata esprimo – antaŭ ne tiom da tempo ĉe ĝia retejo.

Laŭ enketo inter junularo, farita kunlabore kun teamo de psikologoj – do, fidinda, eĉ se la samplo entenis nur 1500 homojn – rezultus, ke la junuloj (44%) komunikas inter si per novaj, tute inventitaj lingvaĵoj, "ia speco de esperanto de la tria jarmilo", utiligantaj terminojn elprenitajn el virtualaj lingvoj.

La nun furoranta (laŭ 64% el ili) estas SIMLISH, tiu slango parolata ene de la videoludo "The Sims 2": miksaĵo el ukraina lingvo kaj filipina dialekto, *Tagalog*, plus influoj de lingvo *Navajo* kaj armeaj kodoj de la 2ª mondmilito.

Sekvas (ambaŭ po 18%) la lingvo KLINGON – kiun parolas la samnomaj alimondanoj en la fama usona sciencfikcia serio *Star Trek* – kaj la lingvo de ELFOJ famigita far la trilogio LA SINJORO DE L' RINGOJ, kiun J.R.R.Tolkien verkis antaŭ pli ol duono de jarcento.

Utiligo de "sekretaj lingvoj", miaopinie, ne estas novaĵo, ĉar preskaŭ ĉiu, en sia junaĝo, partoprenis inventon de grupa lingvaĵo: fakto kiu reinspiriĝas al la invento mem de la diversaj lingvoj, esence voĉaj esprimoj, nome kodo por identigo kaj interŝanĝo de informoj ene de sama teamo, grupo aŭ familio de niaj pra-pra-avuloj.

Krome, la esploro priskribas, ke la plimulto el la enketitaj (57%) komunikas ne plu vid-al-vide sed pere de komunikiloj.

El tiuj ĉi, 33% utiligas poŝ-telefonojn – 26% per la tiel nomitaj «sms» (*short message system* = kurtmesaĝa sistemo, itale *messaggini,* nun anstataŭantaj la "etaj paper-biletoj"-n de nia junaĝo!) kaj nur 7% pervoĉe; komputorojn uzas 21% – retpoŝte aŭ babileje; nur 2% sin konfidas al la tute malmoderna, antikviĝinta poŝto (kaj laŭtempe, kaj reale). La cetera 1% … perdiĝis en la enfalujojn de la labirinta statistiko?!?

Sed, tio ĉi iomete ŝokas: la junuloj, kaj aparte la junulegoj, preferas peradon de iu ilo ol rekta parolado.


Ne eblas scii, kiel la psikologoj taksis tian sintenon: ĝi povus esti simptomo de manko de memsekureco aŭ respondeco, same eĉ volo kaŝi sin malantaŭ ilo por sekretigi siajn sentojn. Certe ĝi ne implicas pripensadon, ĉar ĉiam respondo estas tuja.

Kaj povus esti ankaŭ bezono de protektado kontraŭ la inundo da informoj, sur nin pluvegantaj, fare de la amaskomunikiloj: televidaj kaj radiaj reklampecoj, reklamado surstrata kaj enmagazena, ktp.

Espereblas ke ĝi ne estu simptomo de timo perdi personan identecon per forigo de propra lingvo fronte al la aliaj, pro la tutmondiĝo kaj sekva disverŝiĝo de la t.n. monda lingvo.

Ĉikaze esperanto povus helpi. Eble.

***VIGLO***




## 2007 KARSTAJ TAGOJ EN TRIESTO

### De la 1ª ĝis la 4ª de novembro

Jen, skize kaj koncize, provizora programo:

- vizito de Kastelo de *Duino*, kaj pieda promenado laŭlonge Padon *Rilke*
- vizito de la urbocentro kaj de la Muzeo "Speleovivarium"
- speleologia ekskurso en Karstaj grotoj
- pieda ekskurso tra la tipa Valo *Rosandra*
- pieda promenado en mirinda naturo
- gastronomia itinero inter Karst' kaj maro

**Informoj ĉe TEA**
**(vidu kontakteblojn kvara-paĝe)**

## Jubilea Internacia Ekspozicio "Samarkando en Ĉiuj Kontinentoj"

En aŭgusto 2007 Samarkando, oficiale kaj solene, festos sian 2750-jariĝon aŭspicie de UNESKO. Por celebri la gloran jubileon de ĉi mondfama urbo, la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro kaj loka E-klubo kolektas diversspecajn kaj ĉiulingvajn materialojn (gratulleterojn, vojaĝrakontojn, gazet-artikolojn, librojn, broŝurojn, poemojn, kantojn, fotojn, desegnaĵojn, dokumentojn ktp) pri ĝi kaj ties loĝantoj. Ĉio ajn pri la temo estas tre bonvena! La projekto estas realigata kunlabore kun la Samarkandaj Ŝtataj Muzeoj. La plej interesajn materialojn ni publikigos en nialanda gazetaro. La ricevotaj kontribuaĵoj estos eksponataj en la internacia ekspozicio en la Muzeo pri Historiaj Kulturo kaj Artoj de Uzbekistano. Estas ankaŭ planate eldoni specialan jubilean libron.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn kiel eble plej baldaŭ al:

Anatoli Ionesov
Direktoro Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro
P.O. Box 76, UZ - 140100 Samarkand
Respubliko Uzbekistano
Telefono/ fakso: +998 (66) 233 17 53.
Retadreso: imps86@yahoo.com
http://www.aliaflanko.de/urbo/samarkand/muzeo.html
http://peace.museum.com

Represo kaj nacilingvaj tradukoj dezirataj. Bonvolu doni informojn pri tiu ĉi projekto al viaj amikoj kaj kolegoj.

**Bonvenon al 2750-jara Samarkando**
**Romo de l'Oriento**
**Koro de la Granda Silka Vojo**

En **1989** per la decido de estraro de Ministerio pri kulturaj aferoj en Uzbekistano, la muzeo estis distingita per la honora titolo "Popola Muzeo". Ties moto iĝis la vortoj de la elstara uzbeka poeto kaj humanisto Aliŝer Navoi, kiu jam antaŭ kvin jarcentoj alvokis:

Komprenu, homoj de la tero,
Malamikeco - ja malbeno.
Vivu do ĉiam amikece,
Senkverele kaj fratece.

## 2 ESPERANTO-RADIOJ, 24-HORA ELSENDO

Tage kaj nokte ĝuu aŭ Esperantajn muzikon aŭ radioelsendojn tra interreto!

**Radio-Esperanto.com** Esperanta muziko en 24 horoj, en elektebla formato *mp3* aŭ *ogg*! Krom aŭskulti la muzikon, oni vidas ankaŭ la kovrilon de KD, kaj ofte legeblas ankaŭ la teksto de la kanto. La redaktoro Tony Freeman (tony@radio-esperanto.com) bonvenigas vian helpon per alsendo de mankantaj tekstoj. Aldonu ĝin al viaj favoritoj - http://www.radio-esperanto.com

**Esperanto-Radio Jászberény** Alia radioprogramo estas redaktita de s-ro Harnyos Ferenc (hferenc@pr.hu) en Jászberény, Hungario. La 24-hora elsendo inkluzivas Esperantan muzikon, intervjuojn, reelsendojn de malnovaj programoj, ripeton de programeroj de Pola Radio, ka. Formato de la elsendo-fluo: *mp3*. Ankaŭ ĉi tiun aldonu al viaj favoritoj: http://87.242.26.81:8000/listen.pls

## Kio pri nia jara evento?

Progresadas verve la preparoj! Jen antaŭgustumoj:


★ **Japana eksprese**. Lecionoj pri la japana lingvo okazos tri fojojn dum la kongresa semajno. Akceptis la rolon instrui la fascinan lingvon s-ro ITO Tetsuji, profesoro de Ibaraki-Universitato.

★ **Movada Foiro** post Florenco, ankaŭ en Jokohamo, samtempa kun Interkona Vespero. Ĝi okazos la 4$^{an}$ de aŭgusto vespere en la ĉefa kongresejo. Ĉiuj Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj aliaj movadaj instancoj havos eblecon prezenti sian agadon al la kongresanoj.

★ **Kongresejo "ZAIM"** - Junulara kaj publika programoj okazos en tiu "ZAIM", kiu situas 20 minutojn for de la ĉefa kongresejo. Tre buntas la programeroj dum la kongresa semajno, preparitaj de junuloj kaj lokaj esperantistoj: koncertoj de ASORTI (Litovio) kaj Okinava muzika grupo, prezentado de japanaj produktaĵoj, allogaj ekskursoj en Jokohamo kaj Tokio, kurso de Esperanto por civitanoj, diskoteko ktp, ktp. Pri detaloj vizitu: http://www.k2.dion.ne.jp/~dsn/uk/index.html

*Informis Syozi Keiko, LKKomitatanino en Jokohamo*

## ORATORA KONKURSO



Ankaŭ en Jokohamo gejunuloj povos oratori antaŭ atenta publiko. Precizaj dato kaj loko de la Konkurso estos anoncitaj en la Kongresa Libro. Rajtos partopreni gejunuloj ĝis 30-jaraj, aliĝintaj al la UK. Partopreno estos senpaga, sed la kandidatoj devos skribe anonci sin minimume unu tagon antaŭ la konkurso al la estrarano pri kulturo s-ino Claude Nourmont, moonmont@pt.lu.

La junaj oratoroj povos elekti inter kvar temoj:

- ★ Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto
- ★ Kiel la reto ŝanĝas la Esperanto-movadon?
- ★ Ĉu ni lernas el pasinteco?
- ★ Sciencfikcio - ĉu fantazio aŭ aŭguro?

Oni devos paroli pri la elektita temo libere, sen antaŭpreparita teksto, sed oni rajtos uzi memorigajn notojn. La maksimuma daŭro de parolado estos 10 minutoj. La paroladojn oni taksos el vidpunktoj enhava, lingva, stila kaj laŭ la ĝenerala sinteno de la kandidato kiel oratoro. La plej bonaj konkursantoj ricevos libropremiojn.

### Esperanto-instruisto serĉata por la Respubliko Kongo

Pro ekinteresiĝo de la loka loĝantaro pri Esperanto, sekve de vizito de du eksterlandaj esperantistoj, nun la prezidanto de Kongo Esperanto-Asocio, Eden Loubaki - loubakend@yahoo.fr - serĉas esperantiston, kiu kapablas instrui per rekta metodo (la eŭropa lingvo parolata tie estas la franca), kaj kiu pretas adaptiĝi al la lokaj kondiĉoj. La interesiĝanto pagu mem siajn vojaĝ-kostojn sed li estos gastigata surloke. La restad-periodo dependas de interkonsento kun Eden Loubaki.

**Ni helpu niajn afrikajn geamikojn!**

## *Kie esperantumi en Italio, ĉijare?*

Unue, indas partopreno en la 3ª **SO**mera **LE**rnejo – intensiva lingvoseminario en *Torre Pellice* (apud Torino), de la 25ª ĝis la 27ª de majo 2007. Organizita de Centro Esperanto Torino kunlabore kun Itala Esperanto-Federacio, jam okazinta sukcese en la du pasintaj jaroj, la aranĝo proponas du diversnivelajn kursojn:

A) Bazan kurson *kaj* B) Progresigan kurson, por tiuj kiuj deziras pli profundigi siajn konojn. La gastiganta urbeto, situanta en arbaroj de la piemontaj antaŭalpoj, dum jarcentoj estis la enmigrada centro de Valdanoj, interalie ankoraŭ nuntempe ĉi tie loĝantaj kaj konsistigantaj nombran komunumon. Do, la partoprenontoj havos eblon, krom lerni esperanton, ankaŭ spuri la civilizon de Valdanoj kaj ĝui malstreĉiĝajn promenadojn en mirinda naturo.

Enskribiĝojn kaj informpetojn sendu al Rosanna Perottino zorion99@libero.it Tel. 3392170617 aŭ al Francesco Amerio f.amerio@libero.it - Tel. 3293177378

**La 21ª Kongreso de Katolikaj Esperantistoj**, en *Sestri Levante* (Ĝenovo). Ĝi okazos en belega regiono de la 1ª ĝis la 5ª de junio, en la Centro "*Pastro Enrico Maurí*", ĉe *Opera "Madonnina del Grappa"*. Tre aktualaj kaj interesaj la ĉeftemoj: la unua, religia, pri "Konfronto inter islama kaj kristana spiritecoj" kaj la dua, kultura, pri "Araba kontribuo al okcidenta kulturo".

Antaŭvidataj kompreneble ekskursoj en la regiono de la Kvin Teroj laŭlonge la Padon de l' Amo. Pliaj informoj riceveblas de Milana Centro - Via De Predis 9 - 20155 Milano - tel. 347-4262214 (telefone, nur vendredon vespere) aŭ rete ĉe esperantomi@infinito.it aŭ http://www.infinito.it/utenti/esperantomi/



**La 74ª Itala Kongreso de Esperanto**, en **Pisa** de la 1ª ĝis la 6ª de septembro. Temo de la Kongreso:

**Eŭropo: multaj lingvoj por komuna lando**

Kia la rolo de Esperanto en tiu vasta multlingva teritorio? Krom la diskuto pri la kongrestemo, estas planataj seminarioj, kiuj kovros la plej diversajn interesojn de la partoprenantoj. Jen la listo:

★ ***Kursoj de esperanto***: baza kaj konversacia kursoj – instruos Katalin Kovacs.

★ ***Seminario pri didaktiko de esperanto*** por instruistoj – Paul Gubbins proponos praktikajn ekzemplojn pri efikaj metodoj kaj instruhelpiloj.

★ ***Seminario pri esperanta literaturo*** Eblos interparoli kun tri elstaraj esperantistaj verkistoj, Mauro Nervi, Baldur Ragnarsson kaj Spomenka Štimec, kiuj i.a. legos plej signifajn pecojn el siaj verkoj kaj komentos la evoluadon de esperanta literaturo.

★ ***Seminario pri informadiko*** La temon: "*Libera programaro por libera lingvo" (LINUKSO)* prezentos Massimiliano della Rovere kaj Claudio Imbrenda kiuj donos i.a. la bazajn informojn pri la sistemo.

La kongreso aparte celos renkonton inter la esperantistoj kaj la urbo, tial enprograme, samtempe kun la kongreso, prezentado de pluraj ekspozicioj pri Esperanto kaj pri la lingva problemo tra la urbo. Krome, en la vesperoj oni planas organizi spektaklojn, malfermitajn al la tuta urbo.

Pliajn detalojn kaj aliĝilon oni povas trovi ĉe:
http://www.esperanto.it/html/fei/congresso.htm

## INTERNACIA METODIKA SEMAJNO
## en Herzberg am Harz, la "Esperanto-Urbo"

Temo de la Seminario estas: "Profundigi la pedagogiajn konojn", aranĝo nepre partopreninda por perfektiĝi en instrua kampo. Datoj de la okazaĵo estas:

**de la 29ª de junio ĝis la 7ª de julio 2007,**

sed rapidemuloj povas elekti la semajnfinon de la 29ª de junio ĝis la 1ª de julio. Estas invitataj partopreni kiuj celas praktikan pliprofundigon de la pedagogiaj kaj lingvoinstruaj lertoj kaj konoj de instruistoj/ klubgvidantoj. La ĉeestontoj trejniĝos pri kernaj aspektoj de moderna lingvoinstruado kaj okupiĝos pri lingvopolitikaj demandoj kaj la novaj normoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro. La tuto disvolviĝos per kunagado en etaj grupoj, prezento kaj observado de provlecionoj, ks. Gvidantoj estos Zsofia Korody, Katalin Kovats kaj Sylvain Lelarge de www.edukado.net. Por informoj kaj aliĝoj konsultu: http://ic-herzberg.de aŭ: esperanto-zentrum@web.de

Germana Esperanto-Centro
Interkultura Centro Herzberg, la Esperanto-urbo
Grubenhagenstr. 6 - D-37412 Herzberg/Harz

## Mallonge pri...

**La 209 vortoj de la 9ª Oficiala Aldono** estas nun legeblaj kun difinoj en la ret-paĝaro de la Akademio: http://akademio-de-esperanto.org/oficialaj_informoj/oficialaj_informoj_8_2007.html Ili estas ankaŭ elpreseblaj el PDF-dokumento atingebla ĉe la sama adreso.

el [AdE-Oficialaj-Informoj@googlegroups.com]

**Aŭstria Ministerio** informas en esperanto, danke al s-ro Leopold Patek! Iru al ttt-paĝo: http://www.arbeitsinspektion.gv.at/NR/rdonlyres/56825F26-6ACD-4E72-B8D9-73D47BD9044B/0/arbig_esperanto.pdf

**UEA-prezidanto en Herzberg.** D-ro Renato Corsetti, vizitis la Esperanto-urbon Herzberg (Germanio) duone de marto. Li partoprenis, urbodome, en laborkunsido, speciale kunvokita de la urbestro, kiun ĉeestis diverspartiaj konsilantoj kaj la gvidantoj de ICH. Oni emfazis la vastan rekonon pri sukcesoj akiritaj de la urbo pro ĉi publika utiligo de Esperanto.

**Aperis ...itallingve**: la libro de Paolo Valore "*Materiali per lo studio dei linguaggi artificiali nel '900*", eldonita de CUEM, Milano, 2006, pĝ 183, aĉeteblas ĉe libro-servo de IEF, € 14 plus sendokostoj. Paolo Valore estas profesoro ĉe la Studuniversitato kaj Politeknika Lernejo, ambaŭ en Milano. La libro pritraktas plurajn problemojn pri artefaritaj lingvoj en la pasinta jarcento, inkluzive de esperanto. En ĝi aperas originaj tekstoj en esperanto, ido, interlingua kaj aliaj.

**Rekordo en la Ĉina Universitato Shenyang**, provinco Liaoning. Ekde la 1ª de marto, 600 studentoj vizitas Esperanto-kursojn. Tiu nombro estas la plej alta en la nunaj universitatoj, kiuj enkondukis Esperanton en la provinco. La studentoj akiros 2 studpoentojn se ili sukcese trapasas ekzamenon. La lernolibro estas "Esperanto-Kurso de La Nova Jarcento!", kompilita de la prof-roj Liu Zhengkun kaj Song Yunsheng.

*Raportis Wu Guojiang, vicprezidanto de LEA*



# Beletra Almanako

En septembro aŭ ekde unuaj tagoj de oktobro 2007 estos lanĉita nova literatura periodaĵo, kiu komence aperos unufoje jare (eble dufoje) kaj nomiĝos **Beletra Almanako (BA).** Ĝin redaktas **Jorge Camacho (ĉefredaktoro), Probal Daŝgupto** kaj **István Ertl (redaktoroj)**, dum la **eldonisto** estas **Ulrich Becker** (Mondial, Novjorko). La emblemo de **BA**: **BA**-o gardata de boao en ĉi linoleum-gravuraĵo de Uday Dhar.

Jen klarigitaj de la redaktaroj kialoj kaj celoj de tiu ĉi nova publikigaĵo:

La kultura panoramo de Esperantujo prezentas signojn de stagno. "Fonto" ĉesis aperi, sekve necesas nova internacia literatura revuo. Tamen la tempo ankoraŭ ne maturas por lanĉi paperan revuon, monatan aŭ du-monatan.

Pro tio ni decidis publikigi Beletran Almanakon (ĉi-sekve **BA**). Principe, la almanakon oni ne devos aboni anticipe kiel revuon, sed povas mendi aŭ aĉeti kiel libron. **BA** aperos en normala mezgranda libroformato, kaj ĝi estas facile mendebla, pagebla, aĉetebla, recenzebla aŭ donacebla al amikoj. Ĝi verŝajne ampleksos inter 120 kaj 160 paĝoj.

**BA** enhavos diversajn rubrikojn, nome pri poezio, prozo fikcia aŭ nefikcia, eseoj, recenzoj, intervjuoj, leteroj, debato ktp, originale kaj traduke. **Laŭ interkonsento kun UEA, ankaŭ la verkoj premiitaj en la Belartaj Konkursoj aperos en BA.** Aperos ĉefe materialo speciale verkita por ĝi, sed ankaŭ altkvalitaj tekstoj jam pli frue aperintaj en la reto sed ne surpapere.

Ni invitas vin proponi aŭ anonci materialon, propran aŭ aliulan (vidu niajn regulojn por formatigo de manuskriptaj tekstoj). Ankaŭ ilustristoj kaj desegnistoj bonvenas. Pli detale vidu ĉe: http://www.librejo.com/beletra-almanako/index.html Kontaktoj al Jorge Camacho jorge-zafra@hotmail.com kaj informo@librejo.com

# Kurta KinoEsperanto Festivalo



TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO lanĉas la duan internacian konkurson pri kurtfilmoj, je libervola temo, ital-kaj/aŭ esperant-lingvaj, aŭ alilingvaj sed kun surskribaĵoj en la itala aŭ esperanta lingvoj. La kurtfilmo devas esti en formo de DVD aŭ VHS kaj ne superu 15-minutan daŭron. Ĝi **NE** estos redonita.

La aŭtoro sendu poŝte sian verkon ĝis la 15ª de decembro 2007, al tiu ĉi adreso:

**ESPERANTO TRIESTE**
**C.P. 601 Trieste Centro**
**IT-34101 TRIESTE – ITALIA**

Ĉiuj alvenintaj verkoj estos prezentataj al publiko okaze de S.I.A. (18-25/02/2008).

Pliaj informoj ĉe: noredv@tele2.it kaj http://www.blog.ialweb.it/esperantotrieste/




## *Poma rulaĵo*

*(Strucolo de pomi)*

Ĉirkaŭ antaŭ 2-3 jarcentoj eniris la triestan kuirarton ĉi tiu fama dolĉaĵo, enportita de slovenoj. Ĝi estis akceptita unuanime, tiom ke ĝi fariĝis la plej ŝatata dolĉaĵo de triestanoj. Temas pri tre vaste konata kuko, kies enhavo povas esti tre varia (el ĉerizoj, prunoj, vinberoj, juglandoj, migdaloj, selaktaĵo ktp). Ĉi tie ni prezentas, kiel oni ĝin pretigas en familio, per tre simplaj ingrediencoj.

***INGREDIENCOJ POR LA PASTO***



250 g da faruno
2 kuleroj da olivoleo
1 pinĉeto da salo
varmeta akvo(laŭbezone)



***PREPARADO***

Kribru la farunon surtable, faru centre kaveton kaj verŝu la oleon, salon kaj iom da varmeta akvo. Ĉion bone kunmiksu, ĝis kiam la pasto ne plu alguiĝos al viaj manoj. Tiam knedu ĝin dum ĉirkaŭ dek minutoj, poste ĝin kovru per tuko kaj lasu ĝin dum duona horo ripozi. Dum tiu tempo pretigu la **INGREDIENCOJN POR LA FARĈAĴO**:

60 g da rosinoj (trempitaj en varmeta akvo kun iom da rumo)
30 g da pinsemoj
1 kg da pomoj
100 g da sukero
50 g da paneroj, fritetitaj en butero
iom da pulvorigita cinamo
ŝelraspitaĵo de citrono







En ujo, metu la senŝeligitajn kaj pecetigitajn pomojn, aldonu la rosinojn, elpremitajn el likvaĵo, la pinsemojn, citronan ŝelraspitaĵon, cinamon kaj sukeron. Ĉion bone miksu.

Reprenu la paston, knedu iomete ĝin denove, kaj sur farunumita tuko ĝin rulu je ege maldika folio, kiel papero. Surŝutu gin per la paneroj fritetitaj en la butero, surmetu la poman miksaĵon laŭ la tuta grando de la rulita pasto; envolvu la farĉaĵojn, kaj aranĝu tiun salamoforman rulaĵon, sen la tuko komprenebIe, en formo de huffero, sur bakplato antaŭe kovrita per tiu papero speciala por bakforno.



Brosu la surfacon per ova kirlaĵo, enfornigu la rulaĵon je 200-220 gradoj de temperaturo, kaj ĝin kuiru duonan horon, aŭ iom pli.

Surtabligu ĝin varma aŭ malvarma, laŭ via prefero.

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Redaktanto:** Elda DOERFLER
**Sidejo:** Via Coroneo 15 - 34133 Trieste
**tel/fakso:** +39 040 763128
**Reto:** esperantotrieste@adriacom.it; noredv@tele2.it
**Grupa ttt-ejo:**//it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
**Poŝta adreso:** CP 601 Trieste Centro IT-34101 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

| Maja Programo | |
|---|---|
| 01 - mardo | Sidejo fermita |
| 04 - vendredo | 20h00 - Literatura vespero... kun surprizo! |
| 08 - mardo | 20h00 - Ordigo de hemeroteko |
| 11 - vendredo | 20h00 - *Lecturae Dantis* Esperante, itale kaj triestadialekte |
| 15 - mardo | 20h00 - Ordigo de hemeroteko |
| 18 - vendredo | 20h00 - Priesperanta temo, zorge de Elena Zerpini |
| 22 - mardo | 20h00 - Ordigo de hemeroteko |
| 25 - vendredo | 20h00 - Promene tra Triesto kun Pino |
| 29 - mardo | 20h00 - Ordigo de hemeroteko |

| Junia Programo | |
|---|---|
| 01 - vendredo | 20h00 - Impresoj pri IFEF-Kongreso |
| 05 - mardo | 20h00 - Ordigo de hemeroteko |
| 08 - vendredo | 20h00 - ESPERANTAĴOJ, zorge de Elena Zerpini |
| 12 - mardo | 20h00 - Ordigo de hemeroteko |
| 15 - vendredo | 20h00 - Zamenhof: ĉu vi konas lin ? |
| 19 - mardo | 20h00 - Ordigo de hemeroteko |
| 22 - vendredo | 20h00 - Verboj kun prepozicioj kaj prefiksoj - ekzercada traduko |
| 26 - mardo | 20h00 - Ordigo de hemeroteko |
| 29 - vendredo | **14h40 - RAI Uno - radia alirprogramo pri esperanto**<br>20h00 - Japanio, lando de la ĉijara UK |

***Uno per tutti ... cinque per mille!***

**AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO**

***Il 5 per mille dell'IRPEF*** *all'Associazione Esperantista triestina senza costi per voi!*

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il 5 per mille dell'imposta stessa a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

**La nostra Associazione è fra gli enti che possono ricevere questo contributo.**

Come fare? È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2006 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

**90012340320**

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il **numero di codice fiscale dell'Associazione Esperantista Triestina**

# Ludoj, ŝercoj, enigmoj...




*Solvoj en la julia-aŭgusta TEA-Bulteno.*

**Deviga edziĝo!**

**Aspekte malmoderna,**
**pantalonojn ne portas,**
**dekoltaĵon ne havas.**
**Sed iunokte kune ni kuŝis,**
**kaj nun ĝiskole mi enestas.**

**La Rabviktimo**

**Tere sternita, blanka kiel neĝo,**
**vojon preskaŭ baranta.**
**Kaj uloj, haltante, komentas:**
**"Verdire, pluiri ne eblas!"**

*Solvo de la ludo aperinta en la marta-aprila TEA-Bulteno:* ***La spritaĵo***

## Kravatoj en la dezerto



Forkurinta Al-Kaida-teroristo, bezonante urĝe akvon, paŝis peze tra la iraka dezerto, kiam li vidis ion, kio troviĝis longe en la malproksimo. Esperante trovi akvon, li piediris cele al la objekto, sed li trovis tie nur maljunan judan viron ĉe tablo. Ĉi tiu viro estis vendanta kravatojn.

La teroristo demandis: "Ĉu vi havas akvon?".

Respondis la judo: "Mi ne havas akvon sed mi proponas al vi aĉeti kravaton. Kravato kostas nur 5 dolarojn." La teroristo tiam ekkriegis: "Idiota judo! Formortu ĉiuj judoj! Malaperu Israelo! Mi ne bezonas tro altprezan kravaton. Mi bezonas akvon! Mi vin mortigos, sed unue mi devas nepre trovi akvon."

"Bone," diris la maljuna judo, "ne gravas al mi, ke vi ne volas aĉeti kravaton kaj ke vi malamegas min. Mi montros al vi, ke mi estas pli larĝanima ol supozite. Se vi daŭrigos marŝi super tiun monteton orienten du mejlojn, tie vi trovos judan restoracion ravan. Ĝi havas ĉiom da akvo, kiom vi bezonas. Ŝalom!"

Murmurinte, la homo lampaŝis super la monteton. Post kelkaj horoj li revenis stumblinte kaj preskaŭ kolapsinta.

Tiam li flustris: "Via frato ne permesis al mi eniri sen kravato."